# TRA ESPERANTIO



## 9-a Kongreso de SAT
**en Leipzig (Germ.) 4.—10. aŭg. 1929**

### 4-a Komuniko

**Senprokraste kongresaliĝu!** La ĝisnunaj kongresaliĝoj tute ne kontentigas nin. Tuj aliĝu! Ĉiuj SAT-anoj devas aliĝi, ĉar nur tiel ni sukcesos organizi kongreson plej efikan. Do via aliĝo ne dependu, ĉu vi en aŭgusto kapablos veturi al Leipzig. Ni ne organizas la kongreson por foje kongresi, sed por plej efike varbi por nia afero. Do ankaŭ VI subtenu tiun varbadon. La intereso jam estas granda ĉe la Leipziga laboristaro...!

**Ne-SAT-anoj** ne povas aliĝi la kongreson. Ili antaŭe devas SAT-aniĝi, k nur poste ni povos akcepti kongresaliĝojn. Pro tio kongresaliĝantoj nepre citu sian SAT-matrikulon. Gastoj ankaŭ povos veni al la kongreso, ne-SAT-anoj povos finance subteni nin (p l i ili subtenas nian movadon, se ili unuavice aliĝas al SAT mem), sed por gastoj ni ne povas garantii senpagan loĝejon, escepte por familianoj de SAT-anoj, se ili estas anoncitaj.

**Propagandu** por la kongreso, mendante k uzante la aperintajn sigelmarkojn, leterfoliojn k kovertojn. 15 leterfolioj kun kovertoj kostas 0.50 mk., folio de sigelmarkoj (60 markoj en 3 diversaj specoj) kostas 0.50 mk. Mendu ambaŭ objektojn kune.

**Atentu!** Germanianoj sendu kongreskotizojn, monon por menditaj propagandaĵoj al: W. Kampfrad, poŝtĉeka konto 13 527. Aliĝilojn k mendojn sendu al: W. Kampfrad, Löbauer Str. 35, Leipzig N 24. Gek-doj ekstergermaniaj sendu siajn kotizojn k monon por menditaj propagandaĵoj en monbiletoj aŭ per agentejoj de SAT.

**Mendoj** al propagandaĵoj nur estos plenumataj, kongresaliĝoj nur estos kvitancataj en "S-ulo", kiam ni estos ricevintaj koncernajn sumojn. Mendintoj iom paciencigu, se ili mendis per agentejo aŭ adm. de SAT; sed tuj post ricevo de mendo k mono la mendoj estas plenumataj.

**Sigelmarkoj.** Ĉiu SAT-rondo almenaŭ mendu kelkajn foliojn da sigelmarkoj kaj vendu al esp-istoj kaj aliaj laboristoj poparte-duon-, kvaron- aŭ sesonfolie.

**Kongresafiŝo** baldaŭ aperos. Liverkondiĉojn ni komunikos en sekv. Komuniko.

**Antaŭkongresoj** ĝis nun okazos en Regensburg, Breslau k Rostock. Detaloj en sekv. Komuniko, do atentu! Sed preparu vin jam nun, por ke vi ankaŭ povu partopreni Antaŭkongreson, ĉar tiel vi mem k precipe la movado nur profitos.

**Postkongresaj ekskursoj** estas organizataj al saksa "Svisio", mezgermania industriregiono k saksa metalmontaro. Saksa "Svisio" kun siaj belaj pejzaĝoj certe meritas multnombran viziton; mezgermanian industriregionon, kie okazis plej akraj klasbataloj (ekz. ĉe Leŭna kemiuzino), sendube ĉiu eksterlandano insistas vidi; saksa metalmontaro kun sia hejmindustrio (infanludiloj, ŝtrumpindustrio, teksa hejmindustrio ktp.), kiu laborigas la familiojn kun ĉiuj — eĉ plej junaj — infanoj, prezentas unu el plej mizeraj regionoj de Germanio. Ĉar postkongresajn ekskursojn organizos ne la K. K., sed alilokaj Gek-doj, estas rekomendinde, ke jam nun vi interrilatu kun jenaj K-doj, por ke ili havu certan perspektivon, kiel kaj kiom da partaj ekskursoj ili devas aranĝi: (ĉiuj tri ekskursoj okazos samtempe) K-do Paul Köckeritz, Tharandter Str, 6, IV, Dresden-A. 28 (por saksa "Svisio"); K-do Otto Schiepe, Talstr. 12, Ammendorf ap. Halle (por mezgermania industriregiono; K-do Willi Richter, Innere Bergstr. 8, Thalheim im Erzgebirge (por saksa metalmontaro).

**Informoj** pri fakkunsidoj, vizaferoj, ebleco por monŝanĝado (lasta precipe por Sovetianoj) sekvos.

**Vivkostoj en Leipzig.** Kostas: 1 ĉambro po nokto en popoldomo (privatloĝejoj estos senpagaj) 3 mk.; matenmanĝo 0.60 ĝis 1.20 mk.; tagmanĝo 1 ĝis 2 mk.; vespermanĝo 0.80 ĝis 2.— mk. Detaloj sekvos en artikolo, kiu speciale priskribos la vivkondiĉojn en Leipzig.

**Informpetojn** adresu al: K-do F. C. Richter, Lochmannstr. 2/3, Leipzig O 27, Germanio.

**Atentu k legu la sekvantajn Komunikojn de la K. K.!**

---

**Donacoj por la Kongreso**

Bennewitz, Chemnitz 0.50 g. mk.; Goldfeder, Barnaul 2.— g. mk.; Pacuk, Ardon 2.— g. mk.

---

**KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA LERNANTO"**

### 3. Listo de aliĝintoj

| | | |
|---|---|---|
| 101 | Max Conrad, Auerbach, Germanio | 5856 |
| 102 | Linda Seifert, Auerbach, Germ. | 8708 |
| 103 | Otto Burghardt, Zittau, Germ. | 10523 |
| 104 | Leopold Köhler, Breslau, Germ. | |
| 105 | Willy Bennewitz, Chemnitz, Germ. | 2378 |
| 106 | Otto Elze, Halle, Germ. | 6152 |
| 107 | Marg. Elze, Halle, Germ. | 5312 |
| 108 | Eugen Filimonov, Pskov, Sovetio | 3939 |
| 109 | Jan Lieverstrov, Zwolle, Nederl. | 9332 |
| 110 | Emil König, Gablonz, Ĉeĥosl. | 8896 |
| 111 | Anni Shipman, Birkenhead, Anglio | 9044 |
| 112 | Paul Polivanov, Belgorod, Sovetio | 11562 |
| 113 | Bruno Rönnebeck, Berlin, Germ. | 5381 |
| 114 | Anni Freund-Rönnebeck, Berlin | |
| 115 | Ivanovir Voronin, Bogorodsk, Sov. | 13336 |
| 116 | Zoltan Weizs, Antwerpen, Belgio | 13066 |
| 117 | A.Lebedev, Tver, Sovetio | 960 |
| 118 | F. Goldfelder, Barnaul, Sovetio | 5448 |
| 119 | Grete Strasser, Wien, Aŭstrio | 9261 |
| 120 | Johann Strasser, Wien, Aŭstrio | 4113 |
| 121 | Konst. Fade, Vladivostok, Sovetio | 3717 |
| 122 | Leonid Kurin, Stalingrad, Sovetio | 13295 |
| 123 | Simon Hercik, Stalingrad, Sovetio | 7459 |
| 124 | Willy Schmidt, Weiswasser, Germ. | 9812 |
| 125 | Oskar Schramm, Selb, Germ. | 2419 |
| 126 | Jakov Vlasov, Ŝadrinsk, Sovetio | 10380 |
| 127 | Arthur Mehlhorn, Leipzig, Germ. | 1045 |
| 128 | Nik. Pargaĉevskij, Naĥtaĥe, Sov. | 11746 |
| 129 | Mirono Ler, Kiev, Sovetio | 9082 |
| 130 | Antonin Capoulade, Sète, Francio | 6659 |
| 131 | Joseph Horn, Paris, Francio | 13486 |
| 132 | Johano Jelen, Antwerpen, Belgio | 9132 |
| 133 | Georg Fast, Leipzig, Germ. | 5366 |
| 134 | Paul Michel, Leipzig, Germ. | 5525 |
| 135 | Kurt Hubricht, Leipzig, Germanio | 3550 |
| 136 | Joh. Wonda, Rotterdam, Nederl. | |
| 137 | Dirk Versluis, Rotterdam, Nederl. | |
| 138 | Paul Günther, Leipzig, Germanio | 3164 |
| 139 | Heinrich Siedentopf, Leipzig | 2056 |
| 140 | Else Siedentopf, Leipzig, Germ. | 5683 |
| 141 | Otto Ziegler, Leipzig, Germanio | 9 |
| 142 | Oskar Munche, Leipzig, Germanio | 2299 |
| 143 | Willi Dittrich, Breslau, Germanio | 10595 |
| 144 | Hans Haugeneder, Steyr, Aŭstrio | 8669 |
| 145 | Alois Hofstätter, Steyr, Aŭstrio | 12210 |
| 146 | Petro Burda, Majkop, Sovetio | 12732 |
| 147 | Genadio Deĥterev, Omutninsk, Sov. | 7199 |
| 148 | Carl Mailand, Kassel, Germanio | 265 |
| 149 | Bruno Rödel, Leipzig, Germanio | 12651 |
| 150 | Jean Karey, Mainz, Germanio | 429 |
| 151 | Willi Mühlenweg, Bielefeld, Germ. | 10854 |
| 152 | Ernst Gust, Danzig | 13722 |
| 153 | Kurt Klaps, Danzig | 2421 |
| 154 | Willy Böhm, Hirschberg, Germ. | 11309 |
| 155 | August Tewes, Herne, Germanio | 9879 |
| 156 | Hans Esche, Herne, Germanio | 8198 |
| 157 | Vasilij Pacuk, Ardon, Sovetio | 13256 |
| 158 | Adolf Haidl, Steyr, Aŭstrio | 10828 |
| 159 | Franz Herzy, Wien, Aŭstrio | 8862 |
| 160 | Viktoro Mironov, Samara, Sovetio | |

---

## Komuniko de la Direkcio

**Por ebligi plej baldaŭan konsistigon de nova Ĝenerala Konsilantaro laŭ la deziresprimo de la Göteborga Kongreso, la Direkcio decidis en sia lasta kunveno fiksi kiel daton por la elektoj la 1. aprilo. En tiu dato la voĉdoniloj estos dissendataj al la membraro.**

---

*Plua kandidato por Ĝen. Konsilantaro:*

*K-do Deĥterev G., Omutninsk, 3-a horzono.*